Universala Esperanto-Asocio

AKTIVULA MATURIGO


Estrara Subteamo: MOVADO

*Estrara Komuniko EKO 2017-24 sendita el Budapeŝto, la 2an de septembro.*

*Al: Landaj kaj Fakaj Asocioj de UEA (aliĝintaj kaj ne). Plie al la Komitato, Konsilianoj, regionaj komisionoj de UEA, ILEI-aktivuloj, TEJO-estraro, gazetaro, partoprenintoj en iuj AMO-seminarioj, aliaj listoj kaj unuopuloj.*

Por tuja uzo kaj plia diskonigo inkluzive de la alkroĉaĵoj kun indiko de fonto: EKO de UEA

# AMO turnas sin al BRICS



Unue, memorgio pri la ŝtata kolektivo BRICS: temas pri kvin fortaj landoj kun grandaj kaj foje kreskantaj ekonomioj, kaj granda loĝantaro – 40% de la monda loĝantaro loĝas en tiuj kvin landoj. Landoj, kiuj ludos signifan rolon en la evoluanta mondo – kaj kiuj devus ludi signifan rolon en la Esperanta mondo. Jen la landoj alfabetorde. kun statistikoj (popolo en milionoj, Malneta Enlanda Produkto (MEP), jara ekonomia kresko, kun komentarioj pri la lando, pri Esperanto tie kaj pri AMO.

**Brazilo**: 207m, MEP 10,3 ↗ 0,2%. Lando kiu iam havis fortan ekonomian kreskon, kiu lamas tra lastaj jaroj. Lando kun granda movada historio, kiu nuntempe suferas, ĉefe pro la malfortiĝinta ekonomio kaj la rilata inflacio. Pioniro de AMO, la tria seminario okazis tie en la IJK en Fortaleza, sekvis ĉiujare, la deka (SeminaRIO), la 19a en Manaus. Do, tri seminarioj entute.

**Ĉinio:** 1383m. MEP 8,5 ↗ 6,5%. Lando kun konsterne alta ekonomia kresko (ĉ. 10%) tra pluraj jaroj komence de la nuna jarcento, kiu moderiĝis ĝis la nunaj 6% tra lastaj jaroj. Elformiĝas grandega meza klaso kaj granda nombro de pagipovaj kaj vojaĝemaj civitanoj. Longa movada historio, sed la malfermiĝo al la internacia movado impete ekis en ĉ. 2004. La apero de la Unesko-kuriero en Esperanto heroldas la rolon kiun prenas Ĉinio en la tutmonda movado. Ĝis nun la lando gastigis nur unu AMO-seminarion, la kvaran, en Xian en aŭgusto 2014 – la plej longan seminarion ĝis nun – kun 65 partoprenintoj ankaŭ la plej grandan. Depost tiam, Ĉinio cedis al alia aziaj landoj: Nepalo, Indonezio, Koreio, sed ĉiam ajn povus akcepti plian seminarion.

**Hinda Unio (Barato)**: 1315 m. MEP 1,9 ↗7,2%. Landego kun la plej granda ekonomia kresko jare tra la lastaj jaroj. Elformiĝas signifa meza klaso, malpli evidente ol en Ĉinio, tamen sur diversigita ekonomia bazo, spite la malfacilegaĵojn. La Landa Asocio (FEB) ekzistas jam de 1982 kaj aliĝis al UEA en 1996, sed neniam vere povis funkcii landskale, nelaste pro la grandegaj distancoj inter la urboj kun membroj kaj la manko de rimedoj por vojaĝi. Iugrade la reto devos mildigi tiun bremson. AMO ĝis nun ne okazis en Barato, sed tio estas ja planata oktobre 2017 en la 4a Sudazia Seminario, inter kies celoj estas la fortigo de FEB kaj E-agado en la sub-kontinento. (legu sube).

**Rusio:** 146m. MEP 10.8, ↗ 1.1%. La plej granda lando en la mondo, suferanta inflacion kaj ekonomiajn malfacilaĵojn plejparte pro la malalta oleo-prezo kaj politikaj konsideroj. Forta, longhistoria bone distribuita E-movado, kiu persistis vivi spite al malfacilaj politikaj sintenoj. La ŝanĝoj post 1990 malfermis iujn eblojn, sed fermis aliajn; la movado ankoraŭ esploras kiel prosperi en la novaj kondiĉoj. Ĝis nun ne okazis AMO-seminario en Rusio; nun estas planoj okazigi du en rapida sinsekvo (vidu sube)

**Sud-Afriko:** 55m, MEP 5,6 ↗ 1,0. Lando, kiu kontraŭ atendoj sukcesis transiri sensange de la regado de nur blankuloj al multrasa regado. Persistas ekonomiaj, politikaj kaj sociaj problemoj, sed temas pri multrilate dotita lando, kun diversigita ekonomio kaj relative forta infrastrukturo, laŭ la normoj de la kontinento. Delonge ekzistas esperantistoj, kun la bezono rejunigi sin – estas signoj ke tio okazas (vidu revuon *Esperanto*, januaro 2017 sur p. 17). Tie loĝas la nova kunordiganto de la Afrika Komisiono de UEA; povus tie okazi AMO-seminario, se la Afrika Komisiono rekomendus tion.

*Fonto: Vikipedio. Ekzistas E-paĝo pri BRICS, sed la statisitkoj aperas nur alilingve.*



## *AMO en BRICS*

**AMO 39 Bengaluru:**
Okazos ene de la 4a SudAzia Seminario, 13-16 oktobro 2017. Temo: 'Fortigo de la movado en Sudazio'. Planataj gvidantoj: d-ro Giridhar Rao, d-ro P.V. Ranganayakulu el Barato. Bharat Ghimire el Nepalo, Mirejo Grosjean por ILEI kaj Stefan MacGill por UEA.

**AMO en Moskvo:**
La 3an de decembro 2017. Unutaga 6-hora seminario kadre de la 11a Moskva Esperanto-Renkontiĝo. La temo por la seminario kaj la 11a MER estas samaj: "Publikaj rilatoj kaj Esperanto: tradiciaj amaskomunikiloj, interreto". Ene de tiu temo estos resumo pri la limigitaj ebloj por konigi la lingvon en komunismaj tempoj, kune kun diskutado, kiel tio ŝanĝiĝis en la nuna realeco. Ekzistas prepara teksto de Valentin Melnikov (520 vortoj), kiu resumas la agadon tra la soveta periodo. Gvidantoj kaj pliaj informoj: Dima Ŝevĉenko kaj Anna Striganova, ĉe <revuo.esperanto<ĉe>uea.org>. Estas antaŭvidataj tri pliaj gvidantoj, kiuj nun preparas la temojn.

**AMO refoje en Moskvo:**
20-22 februaro, 2018 en antaŭurbo de la rusa ĉefurbo, tuj antaŭ APERo 12 (22-25 feb.), kiu okazas en longa feria semajnfino. Pliaj informoj: Irina Gonĉarova <mirinda.strigo<ĉe>gmail.com>. Proponata temo: 'Renovigo/Modernigo de la E-movado', Subtemoj: 'Kiel allogi kaj aktivigi gejunulojn,' 'Kiel organizi lokan grupon', 'Kiel organizi lingvan festivalon'. Proponataj gvidantoj estas Irina Gonĉarova, Stefan MacGill, Sofja Zareckaja (nuna volontulo en E@I) kaj Ilja Gnusarjov (eksvolontulo en E@I) aŭ Darja Zelenina (urbo. Ĉelabinsko).

Aliaj ebloj por AMO en 2017. La seminario en Novjorko estas prokrastita. Okazas diskutoj pri seminario en Benino ene de la jaro. Pri ambaŭ informoj sekvos aŭ peteblas de <komuna adreso?>

Vortoj: 815.

===============

Ĉi tiu komuniko estas disponebla laŭ la permesilo Krea Komunaĵo Atribuite Samkondiĉe 4.0 Tutmonde.
Por pli da informoj vidu ĉe: <https://creativecommons.org/licenses/by-sa/4.0/>.

Aperintaj komunikoj legeblaj ĉe: http://aktivulo.net/eo/content/komunikoj-pri-agado

**ALDONU VIN:** Skribu al <stefan.macgill<ĉe>gmail.com>. Neniu alira kondiĉo aldone al valida retadreso. Malferma al Aligitaj Membroj, eksmembroj, neniam-membroj, volapukistoj, klingonuloj ktp.

**SUBTRAHU VIN:** Skribu al la supra adreso. Donu vian nomon, retadreson, landon kaj (se eble) la grupon aŭ kialon por via ĉeesto en la ekspedolistoj.